

Numero: 313.  
Junio: 2018.

26-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Re tadsro: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOSŰARA ESPERANTIO -CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

## Esperanto ne estas mirakla rimedo

Neniu pensu, Esperanto estas ellenebla sen lernado. Kvankam multaj esperantistoj fanfaronas pri nia lingvo, ke ĝin oni apenaŭ devas lerni. Sufiĉas aĉeti lernolibron kaj vortaron. Ili estas metitaj sub la kuseneton kaj ĝis mateno oni jam scias la zamenhofan lingvon.

Se iu opinias tiel pri Esperanto, tiam jam mi nun seniluziigas lin aŭ ŝin.

Verdire ĝi estas logika lingvo kaj ĝia gramatiko estas simpla. Se oni estas diligenta, tiam post kelkaj monatoj jam povas uzi ĝin, aŭ povas ekzameniĝi el Esperanto.

Perfekte ellerni iun lingvon estas neeble. Oni devas lerni ĝin ĝis la tombo. Ni ne forgesu, ankaŭ nian gepatran lingvon ni ne scias.

Do, laŭ mi estus laŭdirinde, se ni parolas sincere pri Esperanto kaj ni ne trompas neesperantistojn.

Mi renkontis homojn, kiuj seniluziĝis el Esperanto, ĉar iu misinformis ilin.

Krome, laŭ mi ne estas necese ĉiukaze konvinki „novulojn” por ke ili fariĝu la membro de iu Esperanto klubo aŭ societo.

Ĉiu mem decida por kio li aŭ ŝi volas uzi la ellernitan lingvon.

Se ni perforte klubanigas la novulojn, tiam post iom da tempo ili sentas, Esperanto estas ia sekto, kiu eluzas ilin.

Esperanto restu helplingvo, kiun oni uzas por ke diverslingvaj homoj povu komuniki.

Eble dum la historio de Internacia Lingvo estis jaroj, eĉ jardekoj, kiam estis moda fondi Esperanto-klubojn, grupojn.

Nun mi vidas tiel, ke estus pli laŭdirinde, se nia lingvo ekaperus en la ĉiutaga vivo sur la stratoj, en oficejoj, vendejoj, stacidomoj ktp. helpante nian vivon.

Kompreneble, se iu sopiras agadi en Esperanto-kluboj, grupoj, ni ne baru antaŭ ili la vojon, sed ĉi lingvo kaj movado renoviĝu kaj ĝi estu egalrajta lingvo kun la aliaj.

— Redaktanto —



## Planedo, kie ekzistis nur unu lingvo

— Antaŭ nelonge mi venis hejmen. Du jarojn mi pasigis sur malproksima planedo en la fora universo.

Nuntempe jam ne estas miraklo viziti planedojn eĉ aliajn galaksiojn.

Dum tiuj vojaĝoj ne la giganta distanco estas la problemo. Tion jam la homaro sukcese solvis. La veturo per lunrapideco estas ĉiutaga afero.

Ofte la komunikado plimalfaciligas tiajn ekspediciojn. Ankoraŭ ne ekzistas universala kosma lingvo, kiun komprenus kaj sciis ĉiu eksterterulo. Pro la nescio de la lokaj lingvoj ofte kaŭzas miskomprenojn, eĉ gravajn konfliktojn.

Sed imagu, kiel mi jam menciis antaŭ nelonge mi alvenis hejmen. En iu fora galaksio ni trovis tian planedon, kie estis nur unusola uzata lingvo. Kvankam la loĝantaro konsistas el diversaj triboj. Malgraŭ tio sur la tuta planedo oni parolas unu lingvon.

Per tiu ĉi belsona kaj simpla lingvo oni perfekte komprenas unu la alian. Ili ne havas lingvajn malfacilaĵojn. Ili ne miskomprenas unu la alian.

Min ne surprizis ilia altnivela tekniko, sed la parolata lingvo.

Se ni, teranoj povus krei tian lingvon, kiom plifaciligus nia vivo. Per ĝi ni povus ŝpari multe da mono, kion ni povus investi por edukado, por sanitaraj aferoj, eĉ sur la terglobo estas multaj lokoj, kie estus tre bone, se ĝi povus evolui, kiuj estas subevoluitaj pro la manko de la mono.

Kiam mi proponis al niaj ministroj, ili rifuĝis de la kopiado de la lingvosistemo uzataj sur tiu malproksima planedo.

Mi ne komprenas kial. Kvazaŭ ilia intereso estus konservi la multlingvecon sur Tero.

Onidire baldaŭ startos nova ekspedicio al tiu planedo.

Mi petis mian ĉefon, ke ankaŭ mi povu partopreni ĝin. Sed li malkaŝis al mi la sekreton, pri kio li ne rajtus paroli. La registraro malpermesis al li, ke ankaŭ mi vojaĝu tien. Mi estos sendata al alia planedo por ke mi studu la vivon de luhomoj.

Mi estas ege trista kaj mi ne scias, kion fari.

— Ŝaŝa —



## Ĉio ne aspektas tiele kiel ni estas pretaj vidi



Jen, mi sidanta apud fenestro iom enpensiganta pro tio apenaŭ aŭdanta siblan sonon venanta de enirpordo.

Ja, ŝajnas al iu estas tre urĝe eniri la domon.

— Pardonon - ekflustris mi aldonante - jen, mi tuj deŝlosigas la pordon.

Miaj okuloj surprize plilarĝiĝis vidinte karan amikino staranta sur la domosojlo. ---Bonan tagon.!

— Kion vi faras, kiam vi ne aŭdis mian fortan sonorilpuŝon — diris ŝi riproĉante, tamen forte braku mane min.

— Aprila vetero-trompa aero. Mi iomete "vaporiĝis" de tie. — ridis mi je angulo de miaj lipoj.

— Ne, mi ne volas aŭskulti vian "batalo kontraŭ ventmuelejoj" pli kviete diris ŝi

— Bone, nun sidigu komforte! Kie vi malaperis tiom da tempo? - demandis mi vere scivolema.

— Mi ne estis ĉi tie. Do vi povas supozi kien mi vojaĝis. Ĉu?

— Jes, mi supozas ...viziti vian filon eksterlanden.

Kaj ni gaje babiladis preskaŭ unu horon kiam ekpluvis ekstere. Okazis vera printempa ŝtormo eĉ elektriĝis. Mi ekflamis kandelon sidigis apud ŝi montrante per unu mano la bele koloritan kajeron, kiam ŝi malgaje balbutis

— Vidu - ,diris ŝi,- tia estas la vivo de malriĉuloj .Oni ofte fortranĉas al ili elektriĝon Nur Dio scias kiamaniere ili hejtas la domon.

— Ho, mia kara ,nobla amikino .- provis mi ĉikani ŝin

— Vi povas fermi la okulojn pri io vidata sed vi ne povas fermi la koron pri kio vi sentas. — respondis ŝi akcentante ĉiun vorton .

-Jes, vi pravas, sed hodiaŭa mondo estas malsolidara . Homo al homo estas lupoj.

Sed ne estas ĉiam tiel . Ĉiutage min surprizas rakontoj pri bonhumoraj homoj, helpemaj ,pretaj volontuloj...

\_Jes, tuj mi trarakontu al vi malkutiman okazaĵon. Aŭskultu ,mi petas Ne ĉio aspektas kiel oni vidas.

— Ĉu vi povas imagi ke oni akuzis dekjaran knabon pro ŝtelado. Nome, li ŝtelis monon de siaj

gepatroj, ĉiam po unu milo da dinaroj.,dum tri monatoj. La gepatroj freneziĝis eĉ ili pridubis la artistinon laboranta ĉe ili .

— Vere malbela rakonto ...Ja ĉiutage mi aŭdas similaĵojn. — diris mi Tiam mia amikino metis ŝian fingron sur mian buŝon kaj ride daŭrigis sian rakonton.- Estu trankvila

kaj aŭskultu

— Vidu, kiam oni demandis la knabon ĉu li ion scias pri ŝtelado ili estis tre surprizitaj, kiam la knabo kapjesis - kompreneble ke mi scias ,ĉar mi ŝtelis de miaj gepatroj monon. Sed mi ne estas ŝtelisto — diris la knabo —mi ŝtelis por donaci kaj tiamaniere helpi malriĉulojn el mia strato Ĉiutage mi aĉetas panon, lakton kaj aliajn varojn por ili . Mi estas helpema ...Ne ŝtelisto ,- brue klarigis la knabo kion li faris . Li staris tiel fiere kaj liaj okuloj feliĉe saltetis al scivolemaj amasiĝantoj, ĉirkaŭantaj lin..

— Ja ,bravo, aplaŭde mi salutis la knaban decidon - respondis mi al la amikino.-Tamen li povis demandi la gepatrojn se ne okazu io simila —aldonis mi serioze.

— Jes, tamen tiel okazis, laŭ rakonto de mia amikino. Bone estas se ĉio bone finis.,kaj ke ĉiuj estis feliĉaj.

— Ja, la vero estas multfaceta .Tiel estas grave ne formi al si juĝon pri io aŭ pri iu. - diris mi .

— Prave vi diris. Ĉu vi scias kiel oni alnomas kaŝado de la vero?

Ŝi ekstaris preta foriri la domon - Mensogo! Ekflustris mi momente.

—Jes ,kara mia, hodiaŭ diri la veron estas malofte diraĵo, ĉar al multaj homoj mankas sincereco.Tiuj mensoguloj ofte diras ke centfoje dirita mensogo fariĝas vero!

— Sed tio ne eblas,laŭte kaj kolere mi diris, - ĉar mensogo ĉiam estas mensogo !.Ĉu ne ?

— Ĝusta! - diris mia amikino haltante mian manon - Nun mi hastas ,eble repluvos Pri la fakto kiel mensogo fariĝas vero mi rakontu al vi alifoje !Konsentite?

## FINO

( Verkis! Miric Jadranka )



# Poezio

Mi renkontis viron, kiu fanfaronis, ke lin ne interesas la poezio. Li ankoraŭ neniam legis poemojn, versojn. Eĉ ankaŭ en la lernejo li serĉis la okazon eviti la versolegdon.

Kiom da similaj homoj ekzistas en la mondo, kiuj forĵetas tiun ĉi perlon de la literaturo.

Esperable geesperantistoj ne estas tiaj homoj. Ni amegas poezion. En Esperantujo estas grandiozaj poetoj, kiuj riĉigis kaj riĉigas nian lingvon.

Ankaŭ vi estas tia homo. Ĉu ne?



**Ivan Naumov**

## Lum' de montoj


Blanka lumo de neĝ' sur dekliv' de lontana  
mont'  
Donis celon al ni alloginte per sia profund'.  
Inter ni kaj montaro troviĝis pordeg' kaj  
pont',  
Ni trairis pordegon per paŝo – dum unu  
sekund'.  
"Farduono", deklaris amik' kun konvinka  
rid',  
Kaj prirevis noktumon en herboj sub klara  
ĉiel'...  
Ni iradis ĝis nokto, kaj restis montar' en  
vid',  
Ni iradis – ĝis suno paligis lumeton de stel'.  
Daŭris ir', kaj plusiĝis irtagoj al longa ĉen',  
Monta neĝo trembrilis restante en sama  
lontan'.  
Ni atingis la finon. Ni trovis montrilon, ke:  
jen,

Trairitas ĉi-tie ĝis fino l' unua span'.

Kiomspanas la ponto? – ja scias neniu krom  
Finvenintoj. Post dors' ne videblas hejmfara  
fum' –

Egalforas por ni la distancoj ĝis mont' kaj  
ĝis dom'.

Preferita, vizaĝojn de ni reheligas l' lum'.



**William Auld**


## Dumnokta aviado

Silent' – krom nur mallaŭta zumo,  
kiu l' orelojn ne molestas.

Obskur' – krom ke fantoma lumo  
en la kajuto fosforeskas.

Senmovaj ŝvebas tuŝ-proksime  
la astroj, kiel mil lampiroj.

En nova mondo mi pilgrime  
flugas en voj' de l' pioniroj...



# Por infanoj



## Soifa arbeto

Iam antaŭ multaj jaroj estis malgranda arbeto. Ĝi staris sola en fora herbejo.

En tiu ĉi jaro estis terura sekeco. Jam depost monatoj ne pluvis.

Ĉio suferis pro la senpluva vetero. La vivuloj forlasis la herbejon. La pejzaĝo iĝis, kiel dezerto. La plantoj forvelkis.

Nur la arbeto vivis ankoraŭ, sed ankaŭ ĝi ege suferis.

Ĉiutage ĝi rigardis supren al la firmamento atendente pluvoplenajn nubojn.

Bedaŭrinde tagoj pasis sen pluvo, eĉ la vetero fariĝis tre varma.

La arbeto apenaŭ povis toleri ĉi veteron. Se baldaŭe ne ekpluvos aŭ okazos io, ankaŭ ĝi mortos.

Ĝiaj folioj jam komencis sekigi. Multaj el ili flaviĝis kaj falis surteren.

— Ve, Dio mia, mi petegas! Donu akvon almenaŭ kelke da gutoj. Se ne ekpluvos mi mortos — preĝis la soifa arbeto.

Pasis tagoj, sed ne pluvis. De tago al tago ĝia vivo fariĝis pli mizera.

Vesperiĝis kaj la arbeto sentis, se nokte ne alvenos pluvo ankaŭ ĝi forvelkos, kiel la floroj kaj herboj.

Ĝi provis dormi, sed ĝi ne povis. La soifeco ege torturis ĝin.

La nokto pasis malfacile. Ĉiu horo estis tre malbona. En ĉiu minuto la arbeto sentis la proksimiĝon de la morto.

Ĝi jam ne esperis, ke ĝi transvivos la sekvan tagon.

Matene la arbeto ne volis kredi al siaj okuloj.

Sur la firmamento ekaperis nigra nubo.

— Ho, mi saviĝis! — ĝi ĝojegis. — Rapide akvumu min kaj la herbejon!

Sed la nigra nubo ne obeis. Ĝi cinike respondis:

— Mi ne donas akvon. Mi iras al la urbo, kie oni aĉetas ĝin. Se vi povas pagi, tiam mi donas ankaŭ al vi akvon.

La arbeto malgajiĝis. Ĝi ne havis monon. La arboj ne bezonas pagilon por vivi sur herbejo. Ĝis nun neniu petis de ĝi monon.

— Mi ne havas monon — ĝi diris preskaŭ plorante.

— Se vi ne helpas min, mi mortos baldaŭe.

— Tio ĉi ne interesas min — respondis la nigra nubo kaj ĝi volis flugi plu.

Ilian paroladon aŭskultis la oĉjo Vento, kiu ĝuste flugadis super la pejzaĝo.

— Ĉu mi aŭdis klare? — ĝi demandis scivoleme. — Ekzistas nubo, kiu ne helpas al soifanta arbeto.

La nubo surpriziĝis. Ja, ankaŭ ĝi bone sciis, nuboj ĉiufoje devas helpi, se ili renkontas soifantojn.

Ĝi volis forkuri, sed la oĉjo Vento tuj venigis siajn filojn, kiuj kuregis post la nigran nubon.

Atingante ĝin komenciĝis giganta batalo. La filoj de la oĉjo Vento ĉirkaŭstaris la nigran nubon, ili devigis ĝin akvumi la herbejon kun la arbeto.

La nigra nubo ne havis ŝancon por forkuri. Post kelkaj minutoj ĝi estis tiel frakasita, ke plorante ĝi petegis:

— Ne batu min! Mi promesas en la estonto mi ĉiam helpos al la soifantoj.

Fine la arbeto kaj herbejo saviĝis. El la nigra nubo kun grandaj gutoj ekpluvis.

Baldaŭe la ĉirkaŭaĵo denove verdis kaj floris. La bestoj revenis kaj feliĉe vivis.

— Onklo Adalberto —



# BESTOJ

# BESTOJ

